

Redakta noto: pri koncepto de Scienca Revuo

"Kiam mi decidiĝis akcepti la taskon ĉefredaktoran, mi neniel estis novulo en la metio, redaktinte fakajojn dum jardekoj - ĉu nacilingve, ĉu en Esperanto. Tamen, okaze de Scienca Revuo, dekomence min embarasis la grava koncepto problemo. Unuflanke insistis radikaluloj, ke SR devas esti original-esplora, ne populariga, kun la strikte laŭ-temaj, ne "miks-potaj" kajeroj, sen ajna organiza enmetaĵo pri ISAE, pri Esperanto-aktualaĵoj, pri Esperantologio kaj similaj. Sole tiaspecan revuon - laŭ ilia, sendube bonintenca opinio - eblas ambicie montri al faka publiko. Aliflanke ne mankis SR-legantoj kun opinio tute mala: oni prezentu sole kajerojn kun miksita enhavo, kun Esperanto-aktualaĵoj k.s.

Ĉar dum la jarkunveno de ISAE revigliĝas la diskuto pri la problemo, mi turnas min al la SR-legantoj kun jena demandaro:

1.1. Ĉu Scienca Revuo servu eksklude por klerigi kaj amuzi ŝatantojn de la scienco kaj teĥniko aŭ

1.2. ĉu ĝi prefere alportadu originajn traktaĵojn, kiuj kontribuas al pli rapida ellaboriĝo de la fakaj terminologioj aŭ

1.3. ĉu ambaŭ artikol-specoj aperadu en Scienca Revuo?

2.1. Ĉu SR-kajeroj estu strikte laŭ-tema, ekz. el unusola scienco, aŭ

2.2. ĉu ĝi enhavu artikolojn el vasta scienc-grupo aŭ

2.3. ĉu ĝi estu kalejdoskope miksita, senkonsidere pri aparteno al soci-kaj natur-sciencoj, teĥniko, esperantologio k.t.p.?

3.1. Ĉu iuj kajeroj estu laŭ 2.1. kaj laŭ 2.2., aliaj 2.3, aŭ

3.2. ĉu neniu kajero estu laŭ 2.3.?

Kvankam mi konscias, ke - dum mi plenumos la funkcion - neniu liberigos min de la respondecado pri SR-koncepto, tamen mi ŝatos esti bone informita pri koncernaj opinioj de la SR-legantaro. Tial mi anticipu dankegas pro ĉiu letero pri la problemo."

Ĉu vi rimarkis, ke la supraj alineoj estas metitaj inter citiloj? Jes - ili ne venas el mia plumo, temas pri citaĵo el la jaro 1981. Vi povas ĝin legi en Scienca Revuo Vol. 32 (1981) kajero 1, n-ro 137, paĝo 16, sub la titolo "Pri koncepto de Scienca Revuo". Estis alvoko de la tiama ĉefredaktoro d-ro *J. Kavka*, kiu volis eltrovi, kiel aspektu nia asocia organo. Sed nur sporade alrampis la enket-respondoj, nepermesante tiri en demokratia maniero el ili saĝigan konkludon. La problemo do estas la sama kiel antaŭ 20 jaroj, kaj dum la tiuĉijara Zagreba UK mi metos denove tiujn demandojn al la ISAE-membroj por klare ekscii la preferojn de la legantaro de Scienca Revuo. Via skriba opinio treege helpos en tiu ĉi denova enketo.

R. Sachs, prezidanto de ISAE

La Internacia Lingvo kiel preventilo de la noosfero

W. GUNTHER

Enkonduko

La ideo, ke la viva materio esence diferencas de la malviva, estas ĉiama temo de tio, kion ni hodiaŭ nomas interdisciplineco en la mondo de kulturo, aparte tiu de scienco kaj teĥniko. Kaj ĝuste la fenomeno de kulturo, kiu diferencigas la konscian kaj scian *Homo sapiens sapiens* de la cetera viva materio, donis kaŭzon por kelkaj konceptoj pri la noosfero. La nocio "noosfero" (= sfero de racio) estas pluevolu-aĵo el tiu de "biosfero". Bazajn informojn pri tio liveras la artikolo "Esperanto kiel noosfera fenomeno" de *Gudskov* (1). La unua, kiu sufiĉe klarvide prezentis la noosferan ideon, estis *Vernadsky* (2).

Laŭ ĉefe geologiaj, geokemiaj kaj biologiaj esploroj la biosfero estas rigardata kiel unueca fenomeno, apartiĝa de la malviva. El ĝi grad-grade evoluas la homa socio kiel geologia forto kun ĉiuj ebloj detruai aŭ prosperigi la Planedon pro la povo, influu la lastan ĝis la skalo de la cirkulado de la atomoj. Tiu evoluo de la homa, ĉefe science dependa socio al "estonta unueco de la homaj organizoj kiel tuteca agadstrukturo" (1) kompreneblas kiel natur-kultura proceso al pli kaj pli efika kaj pli daŭripova memorganizado kaj memkonservada tut-sistemo "Planedo Tero". Precipaj gvidaj trajtoj en tiu evoluo estas la objektiva sciencceco kaj la subjektiva interkonsenta akceptemo de la sociaj agantoj. Finfine la taŭgeco de iu ajn kultura evoluitaĵo kadre de la noosfero dependas de ĝia konformeco al la bazaj bezonoj de memorganizado kaj memkonservado de la sistemo Tero. Jen la devenpunkto de la sekve elmontrita valoro de la Internacia Lingvo.

Valoro de la Internacia Lingvo

1. La utiligado de Esperanto kiel universala kompreniĝilo estas esenca parto de aktiva neŭtraleco. Ĝi funkcias laŭ la principo de demokratia dulingveco: "Ĉiu parolas minimume du lingvojn, la ge-